

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №3



Internacia sendependa magazino. 2017. №3 (269)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Alexander Schlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 60-61.

Abontarifo por 2017

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №3 (269).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 28 февраля 2017 г.

© La Ondo de Esperanto, 2017.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Temo	5
Ekzameneme sekvi la evoluon de la lingvo: Probal Dasgupta respondas	6

Eventoj	10
Ilona Koutny. Nekutima interlingvistika sesio en Poznano	11
Stefan MacGil. Unu tuta tago por la Jaro	12
Richard Delamore. "Amikumu", nova revolucia aplikaĵo por esperantisroj	16
Nova redaktoro-paro por la revuo <i>Esperanto</i>	18
Reza Kheirkhah. Komuna staĝo de koreaj kaj tajvanaj esperantistoj	19
Franciska Toubale. En la varma januaro	20
Katalin Kováts. Sur Olimpo oni parolas en Esperanto	21
Valentin Melnikov. Moskva renkontiĝo en Krasnogorsk	22
Vintre en la kulturcentro Kvinpetalo	23
Christoph Klawe. Pri Esperanto en germana malsanulejo	24
Juan Carlos. Bunta librofoiro denove sukcesis en Havano	25
Varsovia omaĝo al Zamenhof	26
Velado al Itala Kongreso 2017	27
Peter Baláž. Kvar gravaj prilingvaj eventoj en Slovakio en la jaro 2017	28
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Vladimir Bespalov forpasis	30
Koncize (10 informoj)	31

Tribuno	32
Lu Wunsch-Rolshoven. Plibonigi la publikan bildon de Esperantujo	33
Xavi Alcalde. Tradicio kaj moderneco. Parto 2. Pri Louis de Beaufront	38
Jubileoj kaj memordatoj en marto 2017	39
Fabrício Valle. <i>Heroldo</i> stumblas, sed ne falas kaj jam planas sian jubileon	40
Jean-Luc Tortel. Kelkaj vortoj pri la "afero" Lapenna	43

Kulturo	45
Trevor Steele. La lastaj	46
Ralph Glomp. Kiel pligrandigi la Esperantistaron? (Recenzo: Jonny M. <i>Kreativa</i>)	49

Halina Gorecka. Literatura konkurso Liro-2016	50
Internacia Literatura Konkurso Abritus EKRA 2017	51
Itala tradukkonkurso	51
Donaco el Vieno	52
<i>Literatura Foiro</i> , 2016, №284	54
Bernhard Tuidar. En Vieno oni skanas la librojn de Zamenhof	54
Ricevitaj gazetoj	54

Mozaiko 55

Vytautas Šilas. Cepelinoj: Litova bongustaĵo.....	56
Kuirlibro de Zamenhofoj	57
Pri kiu temas.....	58
Valentin Melnikov. Versportreto 6.....	58
Spritaj splitoj kaj preskeraroj	59
Kiel aboni <i>La Ondo</i>	60

Sur la kovropaĝo. Printempo venas al Ruslando kaj al Eŭropo, kaj ni aperigas la konatan pentraĵon de Isaak Levitan (1860-1900) "Printempo. Alta akvo", kiun li kreis en 1895. Estas menciinde, ke Levitan, unu el la plej talentaj ruslandaj pejzaĝistoj, naskiĝis en juda familio en la urbeto Kibarty, tiam en la Avgustova gubernio de Ruslando, nun – Kybartai, urbo ĉe la limo de Litovio kaj la Kaliningrada regiono de Ruslando, bonege konata al la redaktoro kaj eldonanto de *La Ondo de Esperanto*, ĉar kelkajn dekojn da fojoj ili devis traveturi ĉi tiun limurbon survoje al/el Litovio, de kie nia papergazeto estis ekspedata al la abonantoj.

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2017: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://sezonoj.podfm.ru/esperanto/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo

Antaŭ unu jaro, en marto 2016 okazis elekto de la Estraro kaj de la direktoroj de la Sekcioj kaj Komisionoj de la Akademio de Esperanto. Probal Dasgupta iĝis la nova prezidanto de la Akademio. Li afable konsentis respondi kelkajn demandojn de *La Ondo*.



Ekzameneme sekvi la evoluon de la lingvo

Probal Dasgupta respondas

En decembro 2015, kiam la antaŭa prezidanto Christer Kiselman subite eksprezidentiĝis kaj eksakademianiĝis, vi, la unua vicprezidanto, aŭtomate iĝis aganta prezidanto ĝis la elekto de la nova. Kio motivis vin kandidatiĝi por la prezidanteco?

Mi sentis min kunrespondeca pri la navigado de la ŝipo.



La statutaj taskoj de la Akademio estas “konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon”. Nu, la konservado kaj protektado de la Fundamento estas facile komprenebla tasko, sed kiel la Akademio kontrolas la evoluon de Esperanto? La lingvo ja evoluas danke al niaj verkistoj, ĵurnalistoj (precipe temas pri *Monato*), blogistoj, radio-parolantoj k. a.; ĉu la Akademio lastatempe devis interveni por plenumi sian kontrolan taskon okaze de misevolu(et)o?

Kun PIV, mi komprenas la vorton *kontrol/i* kiel signifantan “detale esplori, ĉu io estas tia, kia ĝi devus esti” aŭ “esplori, ĉu io estas konforma al supozo”. Konforme al la rekomendoj de PIV, ni nepre “ne uz[as] **kontroli** en la senco de **regi, gvidi**”. Nia kontrola tasko estas ekzameneme sekvi la evoluon de la lingvo. El kontrolado povas foje elaperi sento de bezono aktive interveni. Sed jam de pluraj jardekoj ni ne estas vokitaj tion fari. La Akademio estis en sia historio plej aktiva en la rolo helpi al la instruistoj de la lingvo: la aperigon de nia *Baza Radikaro Oficiala* vi povas rigardi kiel unu el la plej elstaraj ekzemploj de tia helpo, aŭ pli aktuale la liveron de helpo al la verkantoj de kursa materialo por reta kurso. Ĉi tiu lasta ekzemplo koncernas unuopulojn. Kiel en multaj aliaj sektoroj nuntempe, ankaŭ en nia laborsektoro la agado ofte devas fondi el individuaj iniciatoj, kiu kuntiras la helpopretajn instituciojn. La tradicia metodo de institucia agado, kie necesis cirkuleroj kaj debatoj kaj voĉdonoj por ĉiu paŝo, ne funkcias por pluraj el la hodiaŭaj bezonoj. Kompreneble ni ja ne ĉesis tradicie agadi, sed ni ankaŭ eksterkadre benas individuajn iniciatojn.

La plej konata akademia laboro estas la kompilado de la *Oficialaj Aldonoj (OA)* al la *Universala Vortaro (UV)*. La 9a Aldono aperis ekzakte antaŭ dek jaroj, en marto 2007. Kiam aperos la 10a?

La rapida ellaboriĝo de la 9a OA okazis escepte, pro ne facile ripetebla kombino de favoraj cirkonstancoj: plentempa lingva laborado de unu akademiano, noveco de la reto al multaj liaj kolegoj, relativa sinbrido en la interŝanĝado de opinio-portaj mesaĝoj pri unuopaj vortoj, relativa manko de interrompaj laborpetoj el la publiko. Nun ni laboras sen tiom tempohava unuopulo en niaj vicoj. Niaj kolegoj jam kutimiĝis al la reto. Unu rezulto de tiu fakto – nome, la tre ofta sendado de mesaĝoj – igas la debatojn malfacile partopreneblaj. Nian senhaltan laboradon pri la 10a OA foje interrompas petoj de la publiko, ke pri tiu aŭ alia specifa vorto ni tuj respondu. Tiam ni devas direkti la kolektivan debatan energion al tiu subita atentobjekto, kio malrapidigas la progreson pri la regula laborado, ankaŭ rilate al la 10a OA. Neniu povos do diri, kiam aperos tiu OA. Tamen ne malesperu!

En la Akademia retejo estas la sekcio *Akademia Vortaro*, en kies konsisto estas UV (parto de la Fundamento de Esperanto) kaj la naŭ Oficialaj Aldonoj. Tamen ĝi uzeblas nur kiel serĉilo por vortelementoj, kiuj estas tre malsame prezentataj, jen nur tradukoj, jen klarigo, jen klarigo kun tradukoj... Ĉu kaj kiam oni unuecigos la tuton kaj eldonos ĝin rete kaj libroforme?

En la praktiko, la lingvokomunumo uzis PV kaj ekde 1970 uzas PIV kiel normodonan vortaron internacian, apud la vortaroj perantaj inter Esperanto kaj la etnaj lingvoj. Se ne aperus tia konverĝo de opinioj, niaj antaŭuloj jam ekde la 1930aj jaroj laboregus por produkti kaj intermite reaktualigadi praktike uzendan akademian vortaron. Pro tiu socia fakto pri la praktikaj PV/PIV, la principa *Akademia Vortaro* funkcias kiel konsultilo por kompilantoj de la efektive uzataj vortaroj. Eĉ en tiu rolo ĝi estas ja plibonigenda, sed neniu ĝis nun trovis tion urĝa tagordero por kolektivo kun limigitaj tempo kaj energio. Ni volas tre singarde grimpi tiun monton. Rilate al la tasko, kiun vi nomas la ‘unuecigo’ de la ekzistantaj OA-oj, la principaj problemoj estas sufiĉe krutaj. Individuaj akademianoj faris gravan pioniran laboron por ordigi kaj pritrakti tiujn detalojn. Kiam pluraj inter ni sentos, ke la diskuto maturiĝis, tiam ni ekatakos la monton. Dume, nun kiam ni vizitas la temon, mi volus aldiri, ke nia Sekcio pri Ĝenerala Vortaro jam okupiĝas pri la kompletigo de la Unua OA, kaj tiamaniere komencas pretigi kriteriojn kaj ilaron por la pli granda grimpa defio.

Oni scias, ke la Akademio zorgas pri la leksiko, sed ĉu ankaŭ pri la gramatiko? Jen la eterna demando: ĉu ekzistas almenaŭ konscio pri la bezonateco de Akademia Gramatiko de Esperanto?

Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj

Komenciĝis marto, kaj tio signifas, ke jam pasis pli ol duono de la periodo inter la fino de la Kongresa Sezono 2016 kaj komenco de la Kongresa Sezono 2017. Inter la plej allogaj kongres-sezonaj renkontiĝoj estas la Somera Esperanto-Lernejo, kiu okazos meze de julio en Banská Štiavnica, Slovakio. (Sube estas grupfoto el SES-2015).





Katalin Kováts gvidas la porinstruistan programon en UAM

Nekutima interlingvistika sesio en Poznano

La februara sesio de la Interlingvistikaj Studoj, okazinta la 4-10an de februaro ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) estis speciala el pluraj vidpunktoj. La grupo ankaŭ en sia tria jaro restis rekorda: 16 gestudentoj (el kiuj du ne povis veni).

La kvar specialiĝoj – Esperanta literaturo, Esperanta lingvistiko, internacia kaj interkultura komunikado kaj instruado de Esperanto – daŭrigis sian laboron, la lasta kun aldonaj 13 persistaj partoprenantoj de la unujara instruista trejnado. Pro tio kontribuis pli multe da prelegantoj ol kutime.

La lingvistika kaj komunika specialiĝoj povis ĉeesti la kurson de d-ro Blazio Vaha (Balázs Wacha, Hungario) pri komparo de planlingvoj kaj de prof. Ilona Koutny pri Esperanto kompare kun aliaj lingvoj kaj ĝia rolo en la mondo. La kurson pri nuntempaj problemoj de la Esperanto-movado – por ĉiuj partoprenantoj – gvidis prof. Renato Corsetti, kiu el sia propra grandega sperto povis plilumi diversajn aspektojn, pasintecon kaj estontecon de la movado.

La instruistan programon gvidis d-rino Katalin Kováts (Nederlando) kun nelĉerpebla energio kaj inventemo. Prof. Duncan Charters (Usono) kun granda kompetento gvidis interesan kurson pri Esperanta metodiko inkluzive ĝiajn kulturajn ligojn. Kontribuis prof. Ilona Koutny pri tiklaj problemoj de Esperanto-gramatiko kaj lernfaciligo per Esperanto.

Prof. Vilmos Benczik (Hungario) prezentis resuman kurseton pri la du unuaj periodoj de la Esperanta literaturo al la instruista grupo kaj gvidis kurson kun tekst-analizoj por la literatura specialiĝo. Roman Dobrzyński fermis la sesion per siaj spertoj ĉe la tradukado de la filmigita versio de *Sinjoro Tadeo* de Adam Mickiewicz.

Merkrede okazis riĉa kaj sukcesa simpozio dediĉita al la Jaro de lernanto kun surloka kaj invititaj prelegantoj kiuj prezentis vastan gamon de lernantoj: de infanĝardenuloj tra bazlernejaj kaj universitataj studentoj ĝis maljunuloj (vidu sube).

La merkreda komuna vespero komenciĝis per kortuŝaj rememoroj pri la ĵus mortinta prof. Zbigniew Galor (la edzo de Ilona), kiu regule kontribuis al la antaŭaj sesioj per prelegoj pri la Esperanta kulturo kaj sociologio de la Esperanto-movado (legu pli pri li: <http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=225&s=1159902c0830ab-3575d46c76241327de>). Zuzanna Kornicka kun gitarludo kantis kantojn, kiujn li tradukis. La dua parto de la vespero gastigis la interesan prelegon (kun lumbildo) de prof. Przemek Grzybowski (Universitato de Bydgoszcz) pri instruado per rido en malriĉaj landoj kiel Peruo. Tio ligiĝis ankaŭ al la esplortereno de Zbigniew pri la homoj ekskluditaj.

La laborigan kaj emocian semajnon kompletigis ekskurso al Gniezno fama pro la malnova katedralo. Por la kursanoj sekvis la lasta kaj plej malfacila tasko: verki finlaboraĵon kaj defendi ĝin en la septembra sesio, kiu regalos la alvenontojn per la 4a Interlingvistika Simpozio kun speciala sekcio, dediĉita al Zamenhof, kaj festos la 20-jariĝon de la Interlingvistikaj Studoj.

Ilona Koutny

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Unu tuta tago por la Jaro

La tago? La 8an de februaro en Poznano. La jaro? La Jaro de la Lernanto proklamita de UEA kaj ILEI inter du julioj – tiu de 2016 kaj tiu de 2017, por la tuta mondo. La unutaga aranĝo estis titolita “Simpozio pri la Lernanto en la lingvolerna procezo”. Ĝin malfermis la vicdirektoro de la lingvistika Instituto de la universitato Adam Mickiewicz, prof. Grażyna Demenko. Jen resumo pri la 14 prezentaĵoj de 12 spertuloj el ses landoj (Brazilo, Hungario, Italio, Nederlando, Pollando kaj Usono).

Duncan Charters: Kie la fokuso: la materialo, la instruisto, aŭ la lernanto?

Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kvar gravaj prilingvaj eventoj en Slovakio en la jaro 2017

La jaro 2016 estis unika por la Slovakia Esperanto-movado, ĉefe pro la 101a UK. Ofte oni opinias la kongreson pinto de organiza laboro, kiun sekvas “velko”, ripozo, malaktiviĝo. Ne tiel okazis en Slovakio, la jaro 2017 estos por esperantistoj kaj lingvemuloj ne malpli interesa ol la antaŭa. Ĉefe danke al la agado de E@I, sed ankaŭ de SKEF kaj SKEJ, la videbligo de Esperanto estos bunta ankaŭ ĉi-jare. Okazos kvar internaciaj eventoj, en kiuj Esperanto kaj esperantistoj ludos gravan (ofte, la ĉefan) rolon! Jen ilia superrigardo kaj skiza prezento laŭ la kalendara sinsekvo:

Polyglot Gathering (31.05.–4.06.2017, Bratislavo).

Ĉi tiu “plurlingvula kunveno” estas ĉiujara renkontiĝo organizata por plurlingvuloj kaj lingvoŝatantoj. Ĝi daŭras kvar tagojn kaj kutime venigas pli ol 300 partoprenantojn. Dum la tago okazas prelegoj pri diversaj temoj (metodoj de lingvolernado, prezentoj de unuopaj lingvoj, ktp.), vespere okazas lingvorilata distra programo, ekzemple, ludoj aŭ multlingva koncerto (ekzemple, de JoMo). La ĉefa komuniklingvo estas la angla, sed ĝi ne estas deviga kaj prelegoj okazas ankaŭ en aliaj lingvoj, ĉefe en la germana, franca, hispana, itala, rusa kaj Esperanto.

La unua Polyglot Gathering okazis en 2014 en Berlino. Pluraj el ĝiaj ĉefaj organizantoj (interalie Chuck Smith kaj Judith Meyer) volis krei kunvenon por lingvoŝatantoj kaj transdoni la etoson de Esperanto-renkontiĝoj al neesperantista publiko. Pro tio la funkciado de la kunveno estas tre inspirita de Esperantujo kaj enhavas ekzemple gufujon kaj aligatorejon (kaj tiuj du Esperantaj vortoj estas uzataj).

Ĉi-jare organizos la eventon unuafoje la teamo de E@I, kune kun plurlingvemulino Lýdia Machová (kiu sukcese debutis en Esperantujo ĝuste je la 101a UK kun sia prelego “Kiel efike lerni lingvojn”). Ĝi okazos en la Ekonomia universitato, kaj aŭspicias ĝin la rektoro de la universitato. Krom “ordinaraj” prelegoj oni planas dediĉi jaŭde specialan programon al lingvopolitikaj temoj (pri kiuj ofte eĉ plurlingvuloj malmulton scias) kaj konsciigi homojn pri la bezono de vasta interhoma interkompreniĝo.



Somera Esperanto-Studado (15.-23.7.2017, Banská Štiavnica).

SES estas la plej granda internacia Esperanto-renkontiĝo, celanta lernadon de Esperanto. Ĉiujare, ekde 2007 ĝi okazas somere en Slovakio. Post unujara paŭzo (kaŭzita de la 101a UK en Nitro) SES revenas. Ĝia programo krom instruado konsistas ankaŭ el akompanaj kultur-amuzaj programoj. La Someran Esperanto-Studadon organizas E@I kaj Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ).

SES 2017 okazos en la historia slovakia urbo Banská Štiavnica, 140 km de Bratislavo kaj 105 km de Budapeŝto. La urbeto estas enskribita kiel Unesko-urbo

kaj enhavas plurajn vidindaĵojn, ĝi estas eĉ nomata “la plej bela urbo de Slovakio” kaj vizitata tutjare de multaj turistoj.

La programo konsistas el kelkaj partoj:

- Antaŭtagmeze: instruado de Esperanto;
- Posttagmeze: ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.;

- Vespere: Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmspektado, diskoteko...

La Esperanto-kursojn gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en kvin grupoj, laŭ la lingvo-niveloj de A1 ĝis C2. Aldone prepariĝas aparta kurso/ateliero pri Esperanto-literaturo.

Paralele kun SES okazos samloke ankaŭ Internacia Esperanto-konferenco de OSIEK (<http://ses.ikso.net/2017/osiek.php>) kun la ĉeftemo “Esperanto-literaturo en la 21a jarcento”.



Lingvopolitika konferenco (21.9.2017, Bratislavo)

La konferenco kun la titolo “Lingvaj komunikado kaj kompetentoj en EU (Dungoblo, movebleco, kresko kaj situacio post Briteliro)” okazos en la Ekonomia universitato en Bratislavo. La celo estas daŭrigo kaj plua evoluigo de la diskutoj kaj rezultoj de la Nitra deklaro (http://www.ikso.net/dok/pre-media/nitra_deklaro_2016-7-29.pdf), kiu aperis kiel rezulto de la lingvopolitika konferenco, organizita en la 101a UK en Nitro.

La eventon oficiale kunorganizos Fakultato de aplikataj lingvoj de la Ekonomia universitato kaj E@I, kunlabore kun SKEF kaj eventuale pliaj organizoj. La ĉefa celo estas diskutigi pri la lingvaj temoj politikistojn, lingvistojn kaj reprezentantojn de la civitanaj organizoj. Oni antaŭvidas centon da partoprenantoj de pluraj (ĉefe, eŭropaj) landoj. Kaze de interesiĝo pri partopreno, bv. skribi al peter.balaz@ikso.net, detaloj pri la konferenco aperos baldaŭ ĉe: www.lingvafest.sk. Tiu ĉi lingvopolitika konferenco okazos tuj antaŭ lingva festivalo, kiu okazos dum sekvaj du tagoj samloke (vidu la sekvan priskribon).

LingvaFest' 2017 (22.-23.9.2017, Bratislavo)

E@I delonge havis la ideon okazigi lingvan festivalon, kaj nun venis la momento realigi ĝin. Nun la karto turniĝos – pere de la okazigo de lingva festivalo ĝi povos prezenti siajn projektojn en propra aranĝo, sed eĉ pli grave – doni eblon prezentiĝi al aliaj. En la slovakia ĉefurbo Bratislavo (Ekonomia universitato) do okazos la unua internacia lingva festivalo en Slovakio, kun (ne hazarde) Esperanta nomo “LingvaFest' 2017”.

La ĉefaj celoj de la dutaga evento estas:

- Prezento de diversaj lingvoj kaj kulturoj;
- Veko de intereso pri fremdaj lingvoj;

- Motivigo por lerni lingvojn;
- Prezento de efikaj instrumentadoj, aplikaĵoj, manieroj;
- Spaco por interkonekto de diversaj unuopuloj kaj institucioj, okupiĝantaj pri lingvoj.

LingvaFest' volas iĝi evento "pri lingvoj, kun lingvoj, por lingvoj". Ĝi estos tute senpaga por partoprenantoj! La aŭspicion akceptis la rektoro de la Ekonomia universitato Ferdinand Daňo kaj la direktoro de la Ŝtata pedagogia instituto L'udovít Hajduk.

Kian programon oni povas atendi? Certe buntan, ni malkaŝu almenaŭ parton de ĝi:

- Lingvaj kursoj (de dekoj da lingvoj)
- Lingvaj kvizoj (kun valoraj premioj)
- Konkurso pri la plej lingvema studento
- Trejnado pri interpretado
- Prelegoj je prilingvaj temoj
- Prezentoj de lernejoj, institucioj
- Prezentoj de aplikaĵoj, lerniloj
- Kultura programo (eĉ koncerto de jOmO)
- Lotumado kun valoraj prilingvaj premioj

Peter Baláž
E@I-kunordiganto

Vladimir Bepalov forpasis

La 2an de februaro en Soĉi dum nokta dormo forpasis **Vladimir Ivanoviĉ Bepalov** (1940-2017).

Esperantisto ekde 1963, li dum pluraj jardekoj propagandis kaj instruis Esperanton en Soĉi kaj estis multjara prezidanto de la urba Esperanto-klubo *Laro*. Li aktivis ankaŭ landskale kiel komitatano de SEJM (1966-1969), estrarano de ASE (1979-1989), estrarano de SEU-REU (1990-1999, kun du paŭzoj), kaj partoprenis en la agado de IKEK (Internacia Komunista Esperantista Kolektivo). Dum la lastaj jaroj li ĉiuaŭtune organizis en Soĉi la esperantistan renkontiĝon TILE (Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto).

Ni funebras kaj kondolencas al la proksimuloj de Volo-dja Bepalov, kiu estis nia delonga amiko kaj populariganto de *La Ondo de Esperanto* en la suda parto de Ruslando.



Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov

★ Francesco Maurelli, Sara Spanò k Raúl J. García reprezentis TEJO en la Junulara Forumo 2017 de ECOSOC (Ekonomia k Socia Konsilio de UN) en Nov-Jorko. (*TEJO Aktuale*)

★ Hispana E-Federacio komencis en februaro la celebradon de la Jaro Zamenhof per prelego de la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, pri Zamenhof en la juda kultura centro Sefarad-Israel k per prezentado pri Zamenhof en la publika biblioteko de la kvartalo Vallecas en Madrido, kie funkcias ekspozicio pri Eo. (esperanto.es)

★ TEJO partoprenis ankaŭ ĉi-jare en la Eŭropskala festo YO!Fest, kiu okazis en Matriĥto por celebri la 25an datrevenon de la Matriĥta Traktato. (*TEJO Aktuale*)

★ La Ea PEN-Centro pivotas la kunlaboron inter ĉiuj PEN-centroj en Svislando (la alemana, la romanda, la svisitala k romanĉa); Giorgio Silfer estas komisiita prepari la statuton de fondota societo, kies kolektivaj membroj estos la kvar menciitaj centroj. (HeKo)

★ 14 jan 2017 okazis malferma ceremonio de E-kurso por infanoj en la centra elementa lernejo de la urbo Fenghui (provinco Zhejiang, sudorienta Ĉinio); la kurso, en kiu lernas Eon 21 lernejanoj, estas organizita de la urb-estaro k Zhejiang-a E-Asocio. (*El Popola Ĉinio*)

★ Ekde la jarfino de 2008 ĝis la komenco de 2017 la KER-ekzamenojn de UEA-ITK ĝis nun plenumis 1851 personoj: 531 je la nivelo B1, 554 je B2, 766 je C1; laŭlande: Francio 486, Brazilo 222, Ruslando 134, Meksiko 108, Ĉinio 67, Koreio 66, Germanio 65, Hispanio 56, Italio 52, Japanio 50. (Edukado.net)

★ Komisiono de UEA pri Azia E-Movado (KAEM) planas inviti 15 aktivulojn el aziaj landoj al la 102a UK, okazonta en julio en Seulo, per la kolekto de mono por subteno. (Landa Agado)

★ 30 dec 2016 en la 38a Jarkongreso de la Pakistana E-Asocio estis elektitaj postenuloj por dujara oficperiodo: Shabbir Ahmad Sial (prezidanto de PakEsA, komitatano A de UEA), prof. Rahim Shah Khan (ĉefvicprezidanto), Abdul Qaddoos Shafaqat (ĝenerala sekretario), Tariq Umar Chauhdry (redaktoro de *Facila Esperanto*); Irfan Mehdi (prezidanto de PEJO). (PakEsA)

★ Je 26 jan 2017 al la 102a UK, kiu okazos ĉi-somere en Seulo, aliĝis 795 personoj el 55 landoj; plej multe (136) el la kongreslando Koreio, sekvas Japanio 130, Ĉinio 79, Francio 63, Brazilo 34, Germanio 32, Pollando 25, Ruslando 24. (uea.org)

★ La 8a Afrika Kongreso de Eo estas kunvokita al Burundio por la fino de 2017, la organizon prizorgos SIPU (Societo Internacia por la Paco Universala), aliĝinta al la Pakto por la Ea Civito. (HeKo)

Tribuno

«“Heroldo de Esperanto” estis aĉetita de mi kaj Paulo Lima kaj ĝis la fino de septembro grandaj planoj estis faritaj: lanĉo de reta versio, papera versio kun 20 plejparte koloraj paĝoj, aldono de novaj temoj (ekonomio, edukado, arto kaj kulturo, sportoj, politiko) <...> Sed ni estas jam survoje al la fino de la tri unuaj monatoj de la jaro, kaj eĉ la reta versio de “Heroldo” ankoraŭ ne estis lanĉita. Kio okazas? Ĉu “Heroldo” mortis en la manoj de la brazilanoj?»

Pri la nuna situacio de “Heroldo de Esperanto” rakontas Fabrício Valle.



Plibonigi la publikan bildon de Esperantujo

de Lu Wunsch-Rolshoven



Foto: Joanna Filipowicz-Choroszucha

Esperanton parolanta amiko de mi rakontis scenon el lia laborejo. Li estis kun du kolegoj, unu estis nova en la entrepreno, la alia jam pli longe laboris en la entrepreno kaj sciis, ke mia amiko parolas Esperanton; la novulo ne. Mia amiko ricevis alvokon de Esperanto-parolanto kaj parolis dum iom da tempo en Esperanto. Poste la novulo demandis, en kiu lingvo parolis mia amiko dum la telefonado. “En Esperanto”, informis la alia kolego. “Ho, jes”, diris la novulo, “tiu lingvo, kiun neniu parolas”.

Estas vere fascine, kiom forta estas la kredo de granda parto de la loĝantaro, ke neniu parolus Esperanton aŭ ke ĝi estus morta lingvo. La sceno kun mia amiko certe ne estas la sola. Kelkfoje neniel helpas rakonti la plej belajn okazintaĵojn, ne helpas eĉ interparoli antaŭ ili – la ŝajna scio troviĝas tiel profunde en la kapo, ke ĝi ne elradikiĝas per unu sola fojo.

Ĉu ekzistas komunumo de Esperanto-parolantoj?

Tre impresis min ankaŭ artikolo pri Esperanto, kiun verkis profesoro pri lingvistiko. Li skribis pri la (laŭ lia komenca opinio) mankantaj kulturaj ecoj de Esperanto kaj aldonis, ke tio ja ne mirindas, ĉar “malantaŭ Esperanto ne troviĝas komunumo de parolantoj, kies kulturo influis la evoluon de la lingvo”. Tute logika rezonado: Se vere ne ekzistus la komunumo, neniu kreus kulturon...

Tamen ses liniojn pli sube oni povis legi, ke Esperanto estas rimarkinda inter la mondaj helplingvoj, ĉar “ĝi estas parolata en multnombraj privataj komunumoj kaj asocioj <...> Internacie ekzistas pluraj grandaj Esperanto-asocioj”. Ĉu tion li ne pretis nomi “komunumo”? Mi supozas, ke li ne vere traktis la demandon. Laŭ mi li simple ricevis informojn el du fontoj: La unua estas la kutima onidiro inter lingvistoj. La dua estas tio, kion li legis en diversaj gazetoj kaj facile povis trovi en la interreto. Li havis neniun kaŭzon misfidi al unu el la du informoj kaj fontoj, sekve li prezentis ilin ambaŭ al la legantoj. Ke tio signifis kontraŭdiron, tion li ne vidis, ĉar li neniel suspektis tiaĵon; tro firma estis lia kredo. (Mi cetere apenaŭ iam spertis tiel

kompreneman kaj honestan aŭtoron kiel lin; post mia atentigo li reverkis la enretan artikolon kaj eĉ aldonis mencion pri denaskuloj. Respekton li meritas! Eraroj povas okazi; necesas tiam korekti ilin – kaj bonas.)

Informi pri la Esperantujo de hodiaŭ

La granda celo de la Esperanto-movado estas disvastigi nian lingvon. La komunumo kontraste estas eble iom pli trankvila tiurilate kaj verŝajne supozas, ke ju pli oni uzas la lingvon, ju pli da kulturaĵoj ekzistas, des pli tio konatiĝas, des pli alloga ĝi fariĝas, des pli da homoj lernos ĝin. Aŭ homoj simple ne faras al si zorgojn pri disvastigo.

Disvastigi signifas zorgi, ke homoj decidu lerni nian lingvon; por tio ili bezonas la taŭgajn informojn. Ĉar apliki la lingvon estas tre grava perspektivo, la erara kredo, ke neniu parolas nian lingvon, kompreneble estas pli malpli la mortobato por ĉiu ripenso lerni Esperanton. Tiu kredo, ke Esperanton neniu parolus, respondecas ankaŭ pri tio, ke homoj ne informas aliajn kaj ĵurnalistoj ne volas verki pri ĝi. Se oni volas meti bazon al la disvastigo de Esperanto, oni devas zorgi, ke la fakta Esperantujo de hodiaŭ iĝu konata. Ne nur al centoj da homoj, sed al centmiloj kaj milionoj.

Ankoraŭ mi ne tro bone komprenas, kial kelkaj homoj sukcesas verki tekstojn pri Esperanto sen mencii la hodiaŭan aplikadon. Estas ja tiel bele hodiaŭ: La ĉinoj preskaŭ ĉiutage publikigas novaĵojn en Esperanto, la Esperanto-vikipedio estas jam pli granda ol, ekzemple, la dana aŭ la hebrea, Google Translate, Facebook, Mozilla Firefox kaj Linukso subtenas Esperanton, la katolika eklezio akceptis Esperanton kiel liturgian lingvon, la Esperanto-PEN-Centro membras en internacia PEN, en Hungario ekde 2001 pli ol 35 mil homoj ekzameniĝis pri Esperanto (ŝtate rekonitaj ekzamenoj), ĉe Duolingo registriĝis jam pli ol 700 mil homoj por Esperanto-kursoj, lingvoretejoj kun almenaŭ 25 lingvoj tre ofte ofertas Esperanton, ekzistas jam almenaŭ mil denaskuloj ktp.

Tamen plu ekzistas informaj tekstoj pri Esperanto, kiuj ne mencias ĉion tion, cetere ankaŭ leteroj de legantoj. Kaj, kredu aŭ ne, kelkaj el tiuj informoj venas el Esperanto-organizaĵoj, kies nomojn vi, karaj legantoj, bone konas. (Por ne nur kritiki: La nuntempe rete legebla Esperanto-versio de “Ĝisdate pri Esperanto”, el 2009, mencias multajn faktojn el la tiutempa stato de Esperantujo.)

Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tradicio kaj moderneco

Parto 2. Pri Louis de Beaufront

Louis de Beaufront estis la dua patro de Esperanto. Agnoskita kiel motoro de la franca periodo de la movado, li ĉefrolis klarigante bonstilan lingvon kaj defendante (lingvan kaj ideologian) raciecon. Pro nekonataj kialoj, ekde sia esperantistiĝo li nomis sin marquizo, tiel kaŝante sian veran identecon. Sekve, li iĝus konata laŭ sia kromnomo, tio estas, *markizo* de Beaufront.

Homo de granda talento kaj energio, li multe aktivis en varbado kaj organizado, ankaŭ verkante influajn lernolibrojn, ekzercarojn kaj vortarojn. Fidela apostolo de la majstro, li nur kontraŭis la internan ideon de Esperanto kaj la homaranismon de Zamenhof. Lingve, li defendis la Fundamenton preskaŭ religie. Ideologie, li subtenis absolutan neŭtralecon, kiu tamen ne estis tro for de konservemaj pozicioj (ĉu eblas nekon-servema neŭtraleco?). Por protekti ilian purecon, la markizo senkompatate inkvizitoris la disidentadon.

Eventuale li prenis decidon, kiu turnopunktus la movadon. Plibonigante la malnovan, li kunkreis novan lingvo-projekton, kun novaj revuoj kaj institucioj, kaj sukcesis konvinki sufiĉe da gravuloj, por ke ili sekvu lin. La plimulto de la esperantistoj, tamen, ne transiris al la nova komunumo kaj restis en la tradicia. Eble kiel flanka afero, menciindas, ke en la nova komunumo la povo de L. de Beaufront pli imponus. Ĝi estus (preskaŭ) tiel granda kiel lia ambicio.

Tamen, ekde la komenco tiu plano nepre destiniĝis al fiasko. Ĝi celis la perfektigon de la lingvo... sed kiam oni povas diri, ke lingvo estas tute perfekta? Kion fari, se malsamaj homoj proponas malsamajn reformojn por plibonigi ĝin? El tiu perspektivo ĉiam estos iu, kiu pripensos novan manieron por pliperfektigi ĝin. Kaj tiel okazis. Multe da subtenantoj de L. de Beaufront prezentis siajn proprajn reformojn, kaj tiu komunumo fragmentiĝis paŝon post paŝo ĝis sia malapero aŭ, en plej bona okazo, marĝeniĝo.



Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



“Heroldo” stumblas, sed ne falas kaj jam planas sian jubileon

Heroldo de Esperanto estis aĉetita de mi kaj Paulo Lima kaj ĝis la fino de septembro grandaj planoj estis faritaj. Ekestis grandaj espero kaj scivolemo pri la nova *Heroldo* en la manoj de la eksredaktoro de la revuo *Esperanto*, aŭtoro de ĉi tiu artikolo, kaj lia partnero en la entrepreno Sociala Grupo Lexus. La planoj estis tre ambiciaj: lanĉo de reta versio, papera versio kun 20 plejparte koloraj paĝoj, aldono de novaj temoj (ekonomio, edukado, arto kaj kulturo, sportoj, politiko) flanke la tradicia temo “Esperanto”. Sed eĉ pri Esperanto estis rompo de la tradicio, ĉar la temo Esperanto estos traktita specife kaj fakte kiel tri temoj: Agado por Esperanto, Agado per Esperanto, kaj Lingvoj (pri Esperanto kaj ĉiuj ceteraj lingvoj).

Sed ni estas jam survoje al la fino de la tri unuaj monatoj de la jaro, kaj eĉ la reta versio de *Heroldo* ankoraŭ ne estis lanĉita. Kio okazas? Ĉu *Heroldo* mortis en la manoj de la brazilanoj?

Neatenditaj kaj tre bedaŭrindaj okazaĵoj

Tio kio okazis, estis nekredebla sekvo de malbonŝancaj okazaĵoj:

1. La brazila entrepreno CIELO, kiu okupiĝas pri mastrumado de kreditkatoj,

principe aprobis nian bankan konton (je la nomo de Paulo Lima) por ricevi la monon de la abonoj, kaj la teknikan integriĝon inter la reta abonilo kaj la sistemo de CIELO, sed en la tago de lanĉo de la abonilo ĝi sen prezenti kialojn nuligis la kontrakton. Tio lasis al la esperantistoj nur la eblon aboni *Heroldon* per UEA- kaj FEL-kontoj. Por brazilanoj per rekta sendo de mono. Tio ege malhelpas la varbadon de abonantoj.

2. Paulo Lima malsaniĝis, kaj de la komenco de septembro 2016 li pasigis entute 75 tagojn en hospitalo. La ceterajn tagojn li restis hejme sed devis fari sango-dializon trifoje semajne kaj fakte ne laboris, escepte dum tri semajnoj... kaj je 30% de sia kapablo. La 25an de januaro Paulo Lima mortis.

3. Pro financaj problemoj malfruas la konstruado de la retejo, kiu konsistas el abonilo, reta versio kaj socia reto.

4. Pro la sanproblemo de Paulo Lima, mi devis fari la tutan laboron, kaj mi konfesas, ke inter septembro kaj la fino de januaro mi havis grandajn malfacilaĵojn por mastrumi la lavangon de taskoj.

La nuna stato

Okazis plia tre grava problemo, sed mi ne povas tro profiti de la amika helpo de *La Ondo de Esperanto* por prezenti nur bedaŭrindaĵojn kaj malbonŝancajn okaz-aĵojn. Do mi parolos iomete pri la farataj paŝoj kaj pri nia estonteco:

1. Mi replanas la agadon por la konstruado de nia retejo, kiu estas survoje al finpretigo;

2. Mi daŭre laboras por kreado de la enhavo kun la helpo de valoraj kunlaborantoj;

3. Mi interkonsentis kun la vidvino de Paulo Lima pri transdono de liaj kvotoj en la entrepreno al mi. Do mi estos de nun la sola proprietulo de Sociala Grupo Lexus, la eldonejo de *Heroldo*;

4. Ni jam havas interkonsenton kun grafikisto, kiu respondecos pri la papera versio de *Heroldo*;

5. Ni preparas viglan abonkampajnon por subteni daŭran kaj regulan aperigon de *Heroldo*. Cetere, mi serĉas alternativan pagmanieron, eble per Transferwise.

Resume, mi firme laboras por konkretigi ĉiujn niajn planojn. La tuta afero malfruas, kaj oni povas diri, ke ni stumblas, sed neniuj povas diri, ke ni fiaskis. Nia estonteco estos luma. Ni jam ekpensas pri granda jubileo en 2020, kiam *Heroldo*

Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kelkaj vortoj pri la “afero” Lapenna

En la januara *Ondo* aperis interesa artikolo de H. Tonkin pri la eksigo de Lapenna en 1974. Interesa, sed iom ĝenanta; kaj precipe manka.

Ja ĝenanta, pro la impreso de senkulpiĝo, de praviĝo, kiu likas el ĝi. La sama sento, kiu aperis dum la sekvinta UK, kiam Tonkin persone salutis ĉeporde ĉiun apartan partoprenanton, premante centojn da manoj. Tiu gestaro certe trafis sian celon: reliefigi la kontraston kun la sinteno de l' antaŭa prezidanto; sed tiam ŝvebis ĉe la salutatoj nebuleto de ĝeno.

Ankaŭ manka estas tiu artikolo. Kiam ĝi perfekte priskribas la karakteron de Lapenna, kiam ĝi asertas, ke UEA tamen pluvis kun taŭga estraro, ke Pool pluplenigis la basenon de informoj de CED, ktp, oni senhezite konsentas. Certe Tonkin ne mencias, por la nunaj esperantistoj, kiuj ne konis lin, la holivud-stelan aspekton de Lapenna, lian atletan altstaturon, lian allogan ĉarmon, lian neimageblan oratoran kapablon... sed ĉio tio devas, aŭ devus, esti konita kaj agnoskita de ĉiu samideano (mi intence uzas tiun iom veteranecan vorton “samideano”). Sed kial kaj kiel okazis la dramo, la eksigo de la plej brila defendanto de Esperanto? Kial kaj kiel Lapenna povis esti forpuŝita el asocio, kiun li levis al ĝia plej alta nivelo? Tonkina silento prie.



Tri grupoj kuniĝis kontraŭ Lapenna. La unua konsistis grandparte el anoj kaj eksanoj de TEJO. Aktivemaj, inteligentaj, ili stamfis pro senpacienco al propra regado. Multaj estis livemaj en tiu tempo de la junulara rezisto al la vjetnama milito. Krome kelkaj estis tiel nomitaj “Kunvojaĝantoj”¹ de la komunistaro. Ĉio oponigis ilin al la altjuristo Lapenna, tipo mem de grandburĝo por ili. Oni povas resumi ilian faron kiel *Murdon de l' Patro*².

La dua grupo estis vasta, malpreciza marĉo da grumbluloj, malkontentuloj, ĵaluzuloj, al kiuj la persono mem de Lapenna estis muta riproĉo al ilia senvaloro. Plej trafe priskribis ilian sintenon G. Waringhien. Citante Plutarkon (*Vivo de Aristido*) li memorigas la respondon de antikva greko. Demandite, kial li intencas voĉdoni la

Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>


Kulturo



En la kultura sekcio de la marta “Ondo” estas publikigitaj, interalie, nova originala novelo de Trevor Steele, recenzo de la nova disko “Kreaktiva” de Jonny M, komenco de la listo de libroj kiujn nia biblioteko ricevis el Vieno, kaj la rezulto de nia tradicia literatura konkurso Liro-2016, en kiu laŭreatiĝis Russ Williams kaj Ludmila Novikova (vidu la fotojn ĉi-supre), kiujn ni gratulas.

La lastaj

Novelo de Trevor Steele



Dormado ne eblas. Morgaŭ povos esti lia lasta tago. Iom mirigas, ke Kotuka dormadas, ŝajne trankvile. Kotuka – aŭ ĉu li jam pensu pri ŝi kiel Jatunka? Kaj li: ĉu li ankoraŭ estas Maninga? Morgaŭ li certe estos refoje Dravidja. Se ili devos morti, do kun la originalaj nomoj.

Li iam aŭdis, ke mortanto spirite revizitas la scenojn de la tuta vivo. Kaj do li lasas sian menson revenigi la grandajn eventojn.

• • •

Kiam li estis Dravidja, la tuta klano honoris lin kiel tre sukcesan ĉasiston. Li kaj lia amiko Modjun estis la plej prestiĝaj junviroj. Malofte ili ne sukcesis reveni al la grupo kun kanguruo aŭ emuo aŭ alia besto ĉirkaŭ la kolo. Modjun okupis specialan lokon en lia koro; ili iniciĝis kune, ili ĉasis kune, ili ŝercis kune.

Sed tio ŝanĝiĝis la tagon, kiam li enamiĝis al Jatunka. La pasio ekposedi ŝin blindigis lin; jam iliaj nomoj proklamis al la tuta mondo, ke ilia seksumado estas granda krimo, kaj krome ŝi estis promesita al alia viro kun la ĝusta totemo. Sed li ne povis rezisti la tenton, kaj evidente ŝi sentis similan pasion doni sin al la heroa ĉasisto.

La Leĝo estis absolute klara: viro de lia totemo neniel rajtis havi virinon de la ŝia. Ĝenerale la viroj estis sufiĉe prudentaj por eviti tian problemon. La lasta mortpuno, pri kiu oni ankoraŭ parolis, okazis antaŭ plena generacio. Viroj planantaj ŝteli virinon de alia viro tre atentis, ke ili ne rompu la Leĝon.

Sed Dravidja kaj Jatunka estis pelataj de prainstinkto eĉ pli baza ol la respekto

Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kiel pligrandigi la Esperantistaron?

Jonny M. *Kreaktiva*: KD. Bergisch Gladbach: Los Rockeros Records, 2017.

Jen la demando de multaj grupoj, asocioj kaj kluboj. En Hamburgo ni dum jardekoj varbas ĉe informstandoj por akiri novajn membrojn, regule iniciatas provleciojn ktp. Tamen homoj ne venas al ni post varbado kaj informado, sed je propra intereso eklerni nian lingvon internacian kaj poste plejmultaj el ili daŭre restos. Nun de temp-al-tempo “Esperanto Hamburg” invitas prelegantojn aŭ eĉ muzikistojn, kiuj celas al kaj allogas ankaŭ neesperantistan publikon. Tiamaniere en oktobro 2015 ni starigis la 1an Hamburgan Esperanto-Kantokonkurson kun sep artistoj el kvar landoj. Gajnis la unuan premion ĉarma junulo, kiu temperamente prezentis regeon: Jonny M.



Lia maniero prezenti registile ege plaĉis al mi, kaj ĵus li eldonis sian novan albumon: *Kreaktiva*. Kia kreaktiva titolo. Ĉu krea... aŭ aktiva? Ĉu Jonny M vere kreas je aktivaj Esperantistoj? Mi elŝutis lian muzikon bitforme ĉe *Vinilkosmo*. *Regestilo* ja vere estis elstara albumo, la kanto *Dankon* el ĝi estis la pinto de la sukceso de Jonny. Ĉu eblas, denove atingi tiun nivelon, tian altan kvaliton? Mi ne certis.

Sed jes! Jonny dum malmultaj jaroj kaj post amaso da sursceniĝoj gajnis la respekton de multaj konataj artistoj, kiel Patrik Austin de *Dolchamar*, *La Perdita Generacio* kaj jOmO, kiuj subtenis lin per duetaj kantoj. Tio ne necesas por helpi al la albumo esti pli bona, sed ĝi montras, ke al muzikistoj plaĉas komune krei ion tute novan. La muziko do sonas foje roka, foje repa kaj foje kompreneble regea – sed ĉiam kunkantebla kaj (ofte pli grava ĉe renkontiĝoj) ĉiam kundancebla. “Levi vian pugnon alte kaj espere!” ne nur devigas la pugnon alten, sed ĝi ankaŭ igas la kruojn moviĝi ritme.

Jonny plibonigas mian mondon per la momentoj de atenta aŭskultado ankaŭ per siaj inteligentaj tekstoj. Vortoj pri paco, rimoj kontraŭ kapitalismo kaj kontraŭ militoj tutmonde, gravaj frazoj de DJ Kunar pri libereco... Tiuj ne estas la kutimaj temoj de kantoj, kiel amo aŭ disiĝo (kiel ekzemple ĉe Ralph Glomp).

Kaj la vortoj kaj la voĉo de Jonny estas pli gravaj kaj kortuŝaj, ekzemple kiam li kantas pri la perdo de sia patro. Jonny antaŭ jaroj decidis ne plu manĝi viandon. Unue por helpi al la bestoj kaj due por helpi al la medio. Veganaj vortoj ĉe *Bam bam* – post kelkaj frazoj ĉiuj kapablas kunkanti la ritman kanzonon. Li kreas (li ja estas kreaktiva) ne ofte uzatajn kunmetitajn vortojn kiel “malaĉa” – nekutima, sed uzebla, kaj tiel Jonny ankaŭ estas instruisto al la aŭskultantoj, ĉar li montras al sia publiko, kio eblas per Esperanto.

Jen la fenomeno “Jonny M”: unue la muziko plaĉas al la (precipe, junaj) homoj, ili kundancas, poste kunkantas la tekstojn. Ili volas scii, pri kio temas, kio estas la enhavo de la kantoj. La aŭskultantoj lernas pri vortfarado, lernas novajn vortojn kiuj

estas “mojosaj” por ili. Ili ekkonas la Esperanto-movadon kaj ili fortigas la Esperantan memfidon: *Ni estas fortaj*. Kaj la plej grava afero ĉe lernado estas: *Parolu*.

Laŭ mi la kantoj taŭgas por instru-kurso, por instigi novesperantistojn lerni, ekzerci kaj kunkanti. Kaj tio ĝojigus ilin. Kaj jen denove mia demando de la komenco: “Kiel pligrandigi la Esperantistaron?” Tutsimple. Aĉetu unu, du aŭ tri kompaktdiskojn de Jonny M kaj fordonu ilin al viaj gefiloj, genepoj, amikoj, najbaroj. Post la aŭskultado ili mem volos scii, pri kio temas, kaj tradukos. Jonny ofte kantas ĉe renkontiĝoj tutmonde. En lia retejo troveblas la datoj de liaj venontaj koncertoj. Mi rekomendas viziti koncerton, ĉar registrita muziko estas bonega afero, sed koncerto de Jonny M estas neforgesebla sperto por ĉiuj.

Ralph Glomp

Literatura konkurso Liro-2016

La juĝkomisiono de la tradicia literatura konkurso Liro-2016 (Grigorij Arosev, Edmund Grimley Evans, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korĵenkov, Valentin Melnikov), organizita de *La Ondo de Esperanto*, ricevis sep konkursaĵojn de sep aŭtoroj el kvin landoj: Francio, Kazaĥstano, Pollando, Ruslando kaj Usono. (7 konkursaĵoj en Liro-2015, 11 en Liro-2014, 6 en Liro-2013).



La 23an de februaro 2017 la juĝkomisiono anoncis la rezulton de Liro-2016.

Traduko el la angla: *An Occurrence at Owl Creek Bridge* de Ambrose Bierce.

Laŭreato: Russ Williams (Pollando / Usono)

Laŭda mencio: Hoss Firooznia (Usono)

Traduko el la rusa: *Хвала сонеты* de Konstantin Baljmont.

Laŭreato: Ludmila Novikova (Ruslando)

Laŭda mencio: Jevgenij Georgijev (Kazaĥstano)

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. Konforme al la regularo la organizantoj ĝis la 1a de januaro 2020 havas la ekskluzivan rajton publikigi la premiitajn konkursaĵojn en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

Gratulon al la laŭreatoj!
Dankon al la partoprenintoj!

Halina Gorecka
sekretario de Liro-2016

Internacia Literatura Konkurso Abritus EKRA 2017

La Esperantista Domo de Kulturo “D-ro Ivan Kirêev” (Razgrad, Bulgario) anoncas la tradician Internacian literaturan konkurson pri originala Esperanta poezio kaj humuro. La verkoj devas esti komputile skribitaj kaj subskribitaj per pseŭdonimo. Ili devas esti ne publikigitaj. La nomon kaj adreson de la partoprenanto bonvolu sendi en aparta koverto, se vi uzos poŝton, sed per komputilo skribu ilin en alia letero.

Poŝtadreso: EDK, strato Sveti Kliment 36, ap. 1, BG-7200 Razgrad, Bulgario.

Retadresoj: esperanto_razgrad@mail.bg, dkateva@mail.bg (konkursaĵoj),

ekra_razgrad@mail.bg (pseŭdonimo kaj adreso).

Limdato: la 31a de majo 2017.

La rezultojn oni anoncos en la tradicia festo Abritus / EKRA en junio 2017.

La premiitaj verkoj estos publikigitaj en *Literatura Foiro, Bulgara Esperantisto* kaj *Esperantista Tribuno*. Iliaj aŭtoroj ricevos nian donacon – jubilean antologion *Abritus* (2016), kie vi povus tralegi premiitajn konkursaĵojn de EKRA de 1991 ĝis 2015.

Itala tradukkonkurso

Itala Esperanto-Federacio organizas literaturan tradukkonkurson de la itala al Esperanto. La konkurso konsistas el du branĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita

Prozo: (rakonto, novelo) maksimuma longo 13.000 tajperoj

La komisiono povos asigni ĝis tri premiojn por ĉiu branĉo.

La rezultoj estos anoncataj kadre de la itala kongreso de Esperanto en Heraclea. Ĉiu persono rajtas konkursi por ĉiu branĉo per maksimume tri verkoj, kies traduko devas esti neniam antaŭe eldonitaj per ajna komunikilo (prese, rete, lege, bloge, ktp). La konkursaĵojn, kune kun la originaloj, oni sendu al la sekretario, Ivan Orsini, prefere per retmesaĝo al la adreso concorso@esperanto.it indikante la branĉon, la elektitan pseŭdonimon kaj la efektivan nomon kaj adreson. Se tio ne eblas, oni sendu ilin papere al la adreso Federazione Esperantista Italiana, via Villaresi 38, 20143 Milano, Italia, indikante sur la koverto “literatura konkurso” kaj enmetante la kontribuaĵo(j)n kaj la originalajn tradukitajn verkojn sen ajna indiko kaj notante en aparta folio ĉiujn necesajn indikojn kiel supre.

Limdato por la sendado estas la 30a de aprilo 2017.

Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



En la januara numero Halina Gorecka prezentis la historion kaj kuirmanieron de la Kenigsbergaj klopsoj. La dua plado en nia kuirarta ciklo, dediĉita al tradiciaj manĝaĵoj, estas cepelinoj. Pri la plej konata litova plado rakontas Vytautas Šilas, kiu mem plurfoje partoprenis kuiradon de cepelinoj.

Cepelinoj: Litova bongustaĵo

Cepelinoj (terpomkneloj) estas la plej populara tradicia, tre satiga litova bongustaĵo origine pretigata el raspita terpomo, farĉo, rostitaj lardpecetoj kaj acidkremo. Oni asertas, ke “pracepelinioj” unue aperis en Germanio kaj venis al Litovio nur antaŭ 100-150 jaroj. La nordgermana manĝaĵo *Kartoffelklöße* estas parenco de la litovaj cepelinoj. Litovoj modifis la konsiston de ingrediencoj (ekuzinte porkaĵan farĉon kaj rostitajn lardpecetojn) kaj aldonis al la terpomkneloj la formon de zepelino (litove: *cepelinas*).

Komence cepelinoj estis nur festa manĝaĵo, ankaŭ plado de apudvojaj tavernoj. Cepelinoj tre populariĝis en Litovio dum la postmilita soveta jararo, kiam mankis multaj manĝovaroj, sed terpomoj sufiĉis, kaj ne estis grandaj problemoj pri akiro de porka farĉo. Tiutempe aperis ankaŭ cepelinoj kun kazea kaj kun funga farĉo.

Oni asertas, ke pluraj eksterlandanoj konsideras la teknologion de la cepelina preparado iom komplika. Ankaŭ ne ĉiuj litovaj mastrinoj povas fieri kuiru vere bongustajn cepelinojn. Tamen provu kaj sukcesu! Jen unu el multaj receptoj (por 4-6 personoj):

INGREDIENCIOJ

Terpomoj – 4 kg, lardo – 200 g, farĉo – 1 kg, cepoj – 2, salo – preskaŭ du kuleroj, nigra pipro – iom da, acidkremo – 200 g, faruno – 1 kulero, aneto – iom da.

PREPARADO

1. Unu kilogramon da terpomoj bone lavu, kuiru kunŝele, malvarmigu kaj disretigu per viandmuelilo por fari pureon. La ceteran parton de la terpomoj senŝel-



igu kaj raspu subtile. El la raspaĵo per premo tra gaza teksaĵo ekstraktu la sukono. La suko devas resti stari ĝis la sinko de amelo. Post tio la sukono verŝu en la akvon, en kiu kuiriĝos cepelinoj. La sekan raspaĵon bone miksu kun la pureo kaj amelo kaj salu la terpoman knedaĵon.

2. En porkan farĉon metu etpece distranĉitajn kaj iom rostitajn cepojn, iom da salo, pipron. Ĉion bone intermiksi kaj formu oblongajn pecojn da farĉaĵo. Prenu ĉirkaŭ 80-graman terpoman knedaĵon kaj platigu ĝin surpolme. Surmetu la farĉaĵon kaj ĉirkaŭprenu ĝin per la knedaĵo. El tio ĉi per turnado inter la polmoj formu oblongajn cepelinojn.

3. La cepelinojn metu en grandkvantan bolantan kaj salitan (1 kulero) akvon kaj kuiru (por 15 cepelinoj – uzu 10-litran poton). Post kiam la cepelinoj emerĝos, daŭrigu la kuiradon dum ankoraŭ 15-20 minutoj. Foj-foje kirlu ĉion. Gravas, ke la cepelinoj ne estu dense lokitaj, por ke ili ne kungluiĝu.

CEPELINA SAŬCO

Lardon distranĉu etpece kaj iom rostu, poste metu etpece distranĉitan cepon, farunon kaj ankoraŭ iom rostu. Poste verŝu iom da bolanta akvo kaj boligu ĉion dum 1-2 minutoj. Fine, enmetu la acidkremon kaj diskirlu ĉion.

Fino de la preparado!

Elprenitajn cepelinojn metu en duonprofundan teleron, surverŝu la saŭcon, superŝutu aneton. Bonan apetiton!

Vytautas Šilas

Kuirlibro de Zamenhofoj



Kuirarto de la tempo de Ludoviko Zamenhof en la formo de libro kaj malferma kuirkurso – jen unu el ideoj de Bjalistoka Esperanto-Societo por printempo 2017.

Kadre de la projekto sub la labortitolo *Tagmanĝo ĉe Zamenhofoj* ni prilaboros kaj eldonos dulingvan (polan-Esperantan) kuirlibron kun originalaj kaj rekonstruitaj receptoj el la teritorio de antaŭmilita Pollando kaj priskribo de kuirarto de tiu tempo. La receptoj estos elektitaj kun konsidero de tiuj manĝaĵoj, kiuj povis esti sur la tablo de la familio Zamenhof en Bjalistoko kaj Varsovio. La eldonaĵon

Ĝi estas demonstra versio de la 62-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горещкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paivi.saarinen@iki.fi.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: schwanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefareet 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!



BANSKÁ ŠTIAVNICA (SK)

15 - 23 julio 2017

Venu sperti la plej mojosoŝan someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu:

<http://ses.ikso.net>

